# SALUTON!

**Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĉikago**

**16 Marto 2005** **№ 6** **Redaktoro: Araneo**

**Adreso (provizora):**
**Esperanto Societo de Ĉikago**
**p/a Viktor Pajuk**
**8228 O'Connor Dr., # 2F**
**River Grove, IL 60171**
**(773) 344-2276**
**FAX: (708) 456-2750**

**Estraro:**
Prezidanto – Roberto Stalzer
Vicprezidanto – Karlo Offutt
Sekretario – Viktoro Pajuk
Kasisto – Karlo Gunn

**Membrokotizoj**:
Membro-subtenanto $40/jare;
Familio $30; Regula $20;
Studento aŭ pensiulo $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to: **The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**


## Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenuo, Ĉikago, IL 60625-2101.**
Kutime kunvenoj komenciĝas je **7 PM** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

Estimata leganto, sur la paĝoj de nia antaŭa bultennumero mi informis vin pri la societa kunsido, dediĉita al karmemora Kent Jones. En arĥivo de l'redakcio mi havas interesajn rememorojn pri la fondinto de ESdĈ, verkitaj de G. Novak kaj B. Magallon. Bedaŭrinde spaco de nia eldono ne permesas publiki ĉion. La lasta kunsido estis plejparte prilingva, kie oni parolis pri la uzado de E-interjekcioj (ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj). Dum la kunveno, kiu koincidis kun la internacia semajno de amikeco, oni ankaŭ parolis pri la neceso starigi kontaktojn kun samideanoj el ŝikagaj ĝemelurboj. Ne ĉiuj urboj (eĉ landoj) estas menciitaj en Jarlibro, sed ni penos trovi… Intertempe ni konatigos vin kun la E-kolektivoj el ĝemelurboj, kiuj jam reeĥis al nia alvoko. Ni komencu de l'urbo, kie okazis lastdecembre 'oranĝa revolucio'. Jes, vi pravas, temas pri la ukraina ĉefurbo

## KIJIVO - КИЇВ



Laŭ legendo Kijivo (en la PIV oni obstine uzas rusiigitan nomon Kievo) estis fondita antaŭ pli ol 1500 jaroj de tri fratoj Kij, Ŝĉek kaj Ĥoriv kaj ilia fratino Libid'. La urbo estis nomita laŭ nomo de la plej maljuna frato, tribestro de slavoj-polianoj. Dum la lastaj tridekjaroj oni konstruis du monumentojn memore al tiu familio (vidu pli suban foton). Kun la apero de la ŝtato Kijiva Rusjo la urbo fariĝis tronejo de la princoj. Unu el ili, Volodimir la Granda (980-1015) kristanigis slavajn tribojn kaj konstruis unuajn ŝtonajn preĝejojn, poste ruinigitaj fare de mongoloj kaj tataroj en 1240. Kijiva Rusjo disfloris dum la regado de la princo Jaroslav la Saĝa (1036-54), kiu konstruis ĉ. 400 preĝejojn kaj havis riĉan libraron.
En la XIa jarcento Kijivo estis la plej granda urbo de Eŭropo, 50 fojoj pli granda ol Londono, 10 fojoj – ol Parizo. La filinoj de Jaroslav la Saĝa fariĝis reĝinoj de Francio, Hungario, Norvegio kaj Pollando. Sed en 1240 la urbo estis tute ruinigita kaj forbruligita fare de mongola Ĥano Batij. En XIV jarcento la urbo estis en Pol-Litova Reĝlando. En 1654 apud Kijivo ukraina hetmano Bohdan Ĥmelnickij kontraktis kun moskva caro kaj de tiu tempo Ukrainio restis sub la moskva (poste – rusa) jugo dum la longaj 350 jaroj – ĝis sendependeco, proklamita en 1991.
Nun urbo situanta sur ambaŭ bordoj de Dnipro-rivero havas 3-milionan loĝantaron kaj UNO nomumis ĝin kiel la plej verda (!) metropolo dfe la mondo. Kaŝtano estas simbolo de la urbo, sed sur la urba blazono oni povas vidi urban patronon – ĉefanĝelon Mikelon (vidu supre).

**UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:**
Esperanto.Net –
Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;
toll free: 1-800-ESPERANTO
(1-800-377-3726)
http://www.esperanto-usa.org/

UEA – The Universal Esperanto Association
http://www.uea.org

Free Esperanto Course on Internet
http://www.pacujo.nu/esperanto/course

Esperanto Viva - A free online course
http://www.mintex.demon.co.uk/espviva/angla/index.htm

Esperantic Studies Foundation
http://esperantic.org

Pasporta Servo
http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format
http://osiek.org/aera/en.html

Pola Radio en Esperanto:
http://www.wrn.org/audio/pol1.ram

## Sekvantaj Kunsidoj:

**23an de Marto –** kun sia E-verkaro konatigos nin **Gregoro Dolgin** kaj nia prezidanto prezentos **Persujon**

**27an de Aprilo** –.pri sia sperto de E-tradukisto en mistera Tanzanio raportos d-ino **Gertruda Novak**

**27an de Majo** – nia fora ano **Marko Ŝafrot** gvidos tra la mondo de Mefisto

**22an de Junio** – temo anoncota (prelegonto serĉata)



Novembre-2004 preskaŭ miliono da ukrainoj kolektiĝis protestante sur la ĉefa placo de la urbo – Majdan, por diri 'Ne" al falsifikado de prezidentaj balotoj. Sekve la Supera Juĝejo nuligis voĉdonadon kaj poste estis elektita 'popola prezidento' Viktor Juŝĉenko. Nun tiun eventon oni nomas kiel 'oranĝa' revolucio.
Post du monatoj, maje la urbo gastigos la jubilean 50an muzik-konkurson "Eŭrovizio-2005", ĉar pasintjare ukraina kantistino Ruslana gajnis antaŭan en la turka Stanbulo. Oni nun atendas milojn da gastoj.
Esperantistoj en Kijivo aperies preskaŭ samtempe kun la nasko de la lingvo mem, ĉar en tiu tempo Kijivo, ankaŭ kiel Varsovio – lulilo de E-o, estis parto de la Rusa Imperio. Nun en la urbo funkcias kelkaj E-kolektivoj, la plej fama el kiuj estas E-klubo "Ora pordego", prezidanto – Volodimir Hordienko. Mikelo Lineckij estas Delegito de UEA. En la urbo loĝa(i)s multaj aktivaj samideanoj kaj E-poetoj: N. Andrianova, O. Logvin, d-ro V. Miŝĉenko. Jen estas poemo de kijivano *Petro Palivoda* – ukraina kaj E-a poeto kaj tradukisto.

### Muziko

Solviĝos en muzik' esenco mia,
per ondo kolizias kun etero,
leviĝas super falso, super vero
kaj perdas originon materian.

Foriĝos por eterne homaj limoj,
al mi etendas menojn milionoj.
Fluadas mi – jen bono, jen malbono,
venen', balzam' inspiras la animojn…

…Vizi' degelis, estas mi en ordo,
la samaj kavaj vangoj, sekaj lipoj…
Violonisto arĉas jam ne kordojn,
sed miajn ripojn.

Jen estas mallonga enkonduka vorto pri Kijivo. Sekvanta aperos Varsovio – lulilo de Internacia Lingvo kaj tombo de nia Majstro. Kaj poste ni rakontos pri ĉi jara Esperanta ĉefurbo Vilno (Litovio). Alloke, jam aliĝis al UK tri membroj de nia societo, kiu ankoraŭ planas viziti Esperantion'2005?

**NOTU! ELNA-Kongreso 2005 okazos en Aŭsteno, Teksaso de la 10a ĝis la 13a de Junio. La oficiala kongresa retpaĝaro jenas: http://kongreso.hewgill.com**



Denove kun vi estis araneoesp @ yahoo.co.uk